

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 120 (3/2022) ♦ 31-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org interlingvistiko.net
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://www.facebook.com/esperantic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Artikoloj 3

La Apo "7000 Lingvoj" por Endanĝerigitaj Lingvoj	3
Numismatiko: ne plu kaŝita trezoro de la Esperanto-kulturo (1)	4
Kial festi lingvajn tagojn?	6
Serĉante universalan lingvon	7
Intervjuo kun Anna Löwenstein	9
Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio, kaj Neregistaraj Organizoj – nemalhavebla kunlaboro	11
Nitobe-Simpozio: Lingvo, konflikto kaj sekureco	14

Bulteno 15

Stokholmo+50	15
Metodoj de Interlingva Komunikado	15
"La nigra urbo" en Esperanto	15
Indiĝenaj aferoj	16
Magistriĝa interlingvistiko en Poznano	16
Vortoj, kies sonojn ni amas (kaj male)	16
Plurlingvula Kunveno virtuale	16
Ĉu similas la ukraina kaj rusa lingvoj?	17
Ĉimpanzoj gestas laŭ lingvaj leĝoj	17
Antaŭfigura politiko	17
KER-ekzamenoj rete en junio kaj julio	18
Konferenco LINELT-2022	18
Lingvoscienco kaj komputa scienco	18
Kolokvo kun lingva/eduka temo	19

Evoluo de la konstruoj de lingvo	19
Al ekmastras lingvon	19
Pozitivaj kaj negativaj adjektivoj pri virinoj kaj viroj	20
Sano kaj la gaja hispana vortoprovizo	20
Paroli kun alimondanoj	20
Orwell kaj Esperanto	20
Jarkonferenco de NJTESOL/NJBE	21
Esea premio pri lingva diskriminacio	21
Komuna Voĉo	21
Esperanto kaj religio	21
Kiel infanetoj distingas parolsonojn	22
Konferenco pri lingvo-akirado	22
“Rasismo” havas tro da difinoj	22
Diskriminacio kontraŭ fremdaj akĉentoj	22
Kiel fetoj lernas lingvon	23
Kunekzisto de la afrik-usona kaj la norma anglaj lingvoj	23
Fruaj minacoj al Esperanto	23
Maŝinintelekto kaj la evoluo de ASL	23
Ne ĉiuj libroj kostas	24
Naciigita kosmopolitismo	24
Geedzoj kaj albebj voĉoj	24
Konferenco pri Mediteranea kaj Eŭropa Lingvo-Antropologio	24
Esplorante Inkluzivon / Lingvoj por Demokratio	25
Esperanto kiel pontoreligio	25
165-a datreveno de Grabowski	25
Seminario pri artefaritaj lingvoj en Tours	26
Ĉu Esperanto mortas en Ĉinio?	26
Aliecigo en terorista diskurso	26
Lingva rasismo en Britio	27
Kvirlingvistiko	27

Stipendioj de ESF 28

La Apo “7000 Lingvoj” por Endanĝerigitaj Lingvoj

Stephanie Witkowski

<https://esfconnected.org/2022/04/11/apo-7000-lingvoj/>



Ekzistas ĉirkaŭ 7000 lingvoj en la mondo, kaj preskaŭ duono el ili estas minacataj de malapero. Por la komunumoj, kiuj deziras plu instrui, lerni kaj uzi siajn lingvojn, la perdo estas ruiniga. Endanĝerigo de lingvoj signifas ofte ankaŭ la perdon de historio, ligiteco kaj identeco por la komunumoj, kiuj uzas ilin, same kiel por la cetera mondo.

Por tiuj lingvoj kaj la komunumoj dezirantaj revigligi ilin, malabundas rimedoj. Uzantoj de endanĝerigitaj lingvoj simple ne havas aliron al la lingvolerniga teknologio, kiun disponas uzantoj de la ĉefaj lingvoj. Iuj komunumoj (se ili povas) pagas centojn da miloj da dolaroj al programistoj por krei poŝtelefonajn aplikaĵojn aŭ enretajn lingvoinstruajn kursojn, dum aliaj povas nur esperi, ke grava programfirmao opinios ties lingvon inda je inkluziviĝo en sia platformo. Eĉ pli malhelpas tio, ke multaj el tiuj lingvoj estas parolataj en lokoj sen fidinda aliro al la interreto.

Jen kie sursceniĝas ni. 7000 Languages (“7000 Lingvoj”) estas neprofitita organizaĵo kun misio helpi komunumojn tra la mondo instrui, lerni kaj vivteni siajn endanĝerigitajn lingvojn. Ni ofertas senpagan lingvolernigan teknologion al komunumoj, kiuj siajn endanĝerigitajn lingvojn rehavigas, revigligas kaj konservas. Ni laboras al solvo, kiu ebligas, ke komunumoj kun deziro revigligi sian lingvon disponu jam pretajn memorigokartojn, amuzajn lingvoinstruajn ludojn kaj ilojn pli helpajn, pere de nur siaj poŝtelefonoj. Ni planas ankaŭ oferti eksterretajn lingvolernilojn por tiaj fizikaj lokoj kiel la hejmo, tradiciaj eventoj aŭ la klasĉambro.

Malavare subtenate de Esperantic Studies Foundation, ni konstruas poŝtelefonan aplikaĵon por atingi tiujn celojn – la Apo “7000 Lingvoj” por Endanĝerigitaj Lingvoj. Tiu nova teknologio estos unu el la solaj siaspecaj apoj disponeblaj al indiĝenaj komunumoj, kiuj ŝatus dokumenti kaj revigligi sian lingvon. La apo ebligas al parolantoj de endanĝerigitaj lingvoj krei kaj kundividi memorigokartojn, lingvoinstruajn ludojn kaj eksterretajn lingvolernigajn rimedojn per nur sia poŝtelefono – senpage.

Kiam uzanto de endanĝerigita lingvo malfermos la apojn, tiu vidos la eblon aldoni sian lingvon. En la apo la uzanto estos gvidata por krei lingvoinstruan kurson, inkluzive de propraj bildoj kaj sonoj rekte kapteblaj per kaj alŝuteblaj el la telefono. Uzantoj estos invitataj krei lecionojn pri utilaj esprimoj, sinprezentoj, naturaj elementoj el sia hejmlando kaj la lingvaĵo de tradiciaj praktikoj kaj kunvenoj. Niaj kursokreantoj povos elekti kundividi sian lingvon kun la mondo aŭ teni ĝin privata por nur siaj proksimaj konatoj aŭ loka komunumo.

Kiam floras lingva diverseco kaj indiĝenaj komunumoj, ni ĉiuj gajnas. Riĉa lingvotapiŝo transdonas valorajn informojn pri la ebloj de la homa lingvo, la homaj pensado kaj interligiteco. Ni retenas esencajn informojn pri nia planedo, medikamentoj, tradicioj kaj praktikoj. Ni havas unu plian lenson, tra kiu ni povas rigardi nian mondon. Kaj okazas gravaj gajnoj por tiuj infanoj, kiuj disponas sian indiĝenan lingvon, kiel ekzemple pli bonaj sukcesoj ĉe studado en multaj fakoj, malpliofteco de sinmortigo, deprimado kaj drogmisuzado, plibonigita posta sanstato kaj pli alta memrespekto.


La teknologio kaj rimedoj disvolvataj por lingvorevigligo utilas al ĉiuj lingvoj kaj ĉiuj homoj tra la mondo.

Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (1)

Bert Boon

<https://esfconnected.org/2022/04/25/numismatiko-1/>

Kvankam *Informilo por Interlingvistoj* permesas al ni sufiĉe verve pritrakti ĉi tiun maloftan temon, ni devas atentigi la legantaron, ke la nuna prilumado de la rolo de nia esperanta numismatiko en la kulturo de Esperanto povas montri nur koncizan, malkompletan bildon. Tamen, ni montros facilan vojon al kontentigo de scivolo kaj al kompletigo de kono pri tiu fenomeno per senkosta aliĝo al sufiĉe nova fakgrupo kun propra revuo *Esperanta Numismatiko*.





Ĉu vere ekzistas propra Esperanto-kulturo?

“Esperanto-kulturo” estas perifrazo de la kulturo, kiu estiĝis kaj daŭre kreskas kaj pliriĉiĝas en la sulko de la kulturlingvo de tutmonda diaspora mondkomunumo. Tiel ekestis propra kulturo, samtempe trans- kaj inter-kultura – ekzemple unuflanke per tradukita, aliflanke per originala literaturo. La Esperanto-kulturo estas deirpunkto al aliaj kulturoj. Nia internacia kulturo ampleksas krom simboloj, komunumajn kutimojn, diversajn ideologiojn ktp. Tiel esperantista identeco, blazono de propra kulturo, estas subtenata. Rekomendinda tiurilate estas la *Gvidlibro tra Esperantio*, prikultura vortaro por esperantistoj.

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9191>

Kolektemo estas praa aspekto de homaj psikologia kaj socia kulturspertoj, kaj evidente la pioniroj kaj ties adeptoj komencis kolekti gazetojn, revuojn kaj librojn, en kiuj la lingvo mem suriras la scenejon. Sekve aliajn objektojn, kiel poŝtmarkojn, glumarkojn, afiŝojn ktp. Tiel ankaŭ estiĝis i.a. la nocio ZEO, siglo por “Zamenhof/Esperanto-Objekto”. Tiajn “monumentojn” vaste en la mondo registris Hugo Röllinger en *Monumente pri Esperanto: Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj en 54 landoj*. Jen nur unu el la aro da kulturaj spertoj pere de Esperanto.

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5310>

Kolektantoj, amatoroj kaj numismatoj

Do, sendube post 1887 la kolektantaro de esperantaĵoj senĉese kreskadis kaj ekdiferenciĝis. Trafoliumado de tiamaj gazetoj kaj revuoj montras, ke la aro de filatelitoj spontane kreskadis, kaj ke baldaŭ aperis la unuaj katalogoj pri filatelo. Kolektantoj de aliaj objektoj, krome tiuj de legaĵoj, estis nur foje-foje servataj per rubriketoj en ĝeneralaj aŭ fakaj revuoj. Inter ili domaĝe ankaŭ numismatoj. Sufiĉe ĝisfunda esplorado en kolektoj de diversaj bibliotekoj montras, ke inter 1887 kaj nun neniam estis eldonita katalogo aŭ terminaro pri esperantaj numismatikaĵoj. Kial ne? Ĉu la kvantoj kaj kvalitoj de moneroj aŭ medaloj estis tiel

sensignifaj, bagatelaj, ke neniŭ aspirant-numismato aŭ numismato-esperantisto kolektis kaj priskribis ilin? Certe ne, sed la kaŭzo(j) estu estoncece la temo de serioza scienca esplorado.

Privata kolekto, rikolto de proksimume du jardekoj, supozigas tamen, ke tiu kolekto eble estas nur la pinto de nekonata, ne jam videbla “glacimonto”. Renkonto dum silvestra Esperanto-festo en Germanio (Internacia Festivalo, IF) kun senpretenda kolektanto-numismato Hans Jankowski elmontris, ke tiu fakulo aŭtodidakta pri esperanta numismatiko jam eldonis tri broŝurojn kun nemalhaveblaj rezultoj de ĝis tiam apenaŭ konata esplorado. Tiuj broŝuroj iĝis la fundamento por la fondo en 2014 de la unua esperanta numismatika fakgrupo en la historio de nia movado, kiu estu la lanĉejo de tricela projekto por antaŭe preskaŭ malplena kulturniĉo de Esperantujo:

1. Informado de esperantistoj kaj de la cetera mondo de numismatoj pri nekonata trezorujo de la propra internacia kulturo
2. Preparado de eldono de la unua *Katalogo de Esperanto-Numismatiko*
3. Preparado de eldono de la unua *Fakterminaro de Esperanto-Numismatiko*

En la venontaj du serioj ni montros al vi respektive kiel rolis pioniroj kiel De Saussure, Cseh k.a., provantaj krei internacian monunuon sub la devizo de “Unu mondo, unu lingvo, unu mono”, kaj kiel (ofte superbaj) medaloj de eminentaj skulptistoj prilumas kaj ilustras la plej gravajn personojn kaj eventojn en la historio de nia movado.

Bert Boon estas belga esperantisto, kiu iniciatis Esperanto-Numismatikan Asocion, la unuan numismatikan UEA-fakgrupon, kaj redaktas ĝian revuon Esperanta Numismatiko. La revuo kaj asocia membriĝo estas senkostaj.

Kial festi lingvajn tagojn?

Humphrey Tonkin

<https://esfconnected.org/2022/05/09/kial-festi-lingvajn-tagojn/>

Kial la Esperanto-movado festas la specialajn tagojn de la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj? Tiuj lingvoj fariĝis fortaj ne pro siaj kulturaj atingoj – kvankam tiuj atingoj estis grandegaj – sed pro sia milita kaj ekonomia potenco.

Tri el ili – la angla, franca kaj hispana – fariĝis mondaj lingvoj pro siaj transmaraj kolonioj kaj aliaj posedaĵoj, kiujn ili konkeris perforte. La aliaj tri – la araba, ĉina kaj rusa – disvastiĝis pro ekspansio de difinitaj popoloj, kiuj simile konkeris apudajn landojn por formi (en la ekzemplo de la rusa kaj la ĉina) fizike kontinuajn imperiojn kaj (en la okazo de la araba) grandan religian interesosferon.



En ĉiuj ekzemploj, tiuj grandaj lingvoj sukcesis interalie per subpremo de aliaj pli malgrandaj lingvoj kaj ties moroj: tiuj grandaj lingvoj fariĝis lingvoj de komerco, de administrado, de edukado, kaj de ekspluatado.

Ili produktis siajn Ŝekspirojn, siajn Cervantojn, kaj ili meritas nian atenton pro tio – kaj same pro siaj elstaraj atingoj en scienco, medicino, agrikulturo, klerigo k.s. Multaj tiuj atingoj rezultis el la disvastiĝo de la koncernaj lingvoj, sed koste je ĉiuj aliaj lingvoj.

Restas la fakto, ke la grandaj lingvoj subpremis la malgrandajn: la parolantoj de tiuj lingvoj kreis por si avantaĝojn super tiuj, kiuj ne parolis tiujn lingvojn. Ili praktikis diskriminacion, malegala traktadon de aliuloj, kaj ofte sisteman subpremon de la saĝo kaj moroj de aliaj lingvogrupoj. Ili alportis la avantaĝojn de unulingveco en siaj teritorioj, sed kun subpremo de aliaj lingvoj.

Tiuj grandaj lingvoj, hodiaŭ en la 21-a jarcento, havas siajn festotagojn – kaj indas rekoni iliajn atingojn, se temas pri tutmondigo de ideoj, scioj, teknologio, klerigo. Sed samtempe necesas, ke ni, kiel esperantistoj, dum ni laŭdas Ŝekspiron, Molieron aŭ Ĉeĥov, rekonu, ke la superrego de la grandaj lingvoj metas ŝarĝon sur la ŝultrojn de ĉiuj aliaj popoloj, kaj ke la ebleco de tutmonda lingva komunikado ne estas afero de egaluloj inter egaluloj, sed de potenco super malforto.

Esperanto celas sian specon de ekspansio, sed ne politikan ekspansion, nek imperian, sed ekspansion de lingva egaleco tiel, ke ĉiu homo, el ĉiu angulo de la mondo, havu aliron al la kulturaj kaj materiaj riĉaĵoj de la mondo kaj povu labori por la konservado de sia tergloba hejmo.

Serĉante universalan lingvon

Yauheniya Hudziyeva

<https://esfconnected.org/2022/05/23/serchante-universalan-lingvon/>

La 25-an de marto 2022, panelo “Serĉante universalan lingvon: Esperanto kaj politiko en Orient-Azio” okazis en la jarkonferenco de Asocio por Aziaj Studoj en Honolulu (Havajo).

La panelo prezentis artikolojn de Joshua Fogel (Universitato de York, Kanado), Yauheniya Hudziyeva (Vaseda-Universitato, Japanio), Kazumi Kamimura (Josai-Universitato, Japanio) kaj Edwin Michielsen (Universitato de Toronto, Kanado), kun diskutigaj komentoj de Nadine Willems (Universitato de East Anglia, Britio).

Prezentoj diskutis la kulturan kaj politikan historion de la Orientazia Esperanto-movado, ekde ĝia komenco ĝis la fino de la Dua Mondmilito en 1945. Oni ekzamenis la transnaciajn trajektoriojn de inter-orientazia interŝanĝo kaj solidareco de esperantistoj, kaj ankaŭ la diversajn ambiciojn, esperojn kaj strategiojn, kun kiuj la movado respondis kaj adaptiĝis al la politike malfacilaj tempoj en la historio de la regiono.



Unue, la artikolo de **Joshua Fogel** “La frua historio de Esperanto en Ĉinio kaj Japanio” faris enkondukon pri la fundamenta historio de la monda esperantista movado kaj skizis la vojojn, laŭ kiuj la lingvo estis enkondukita en Nordorienta Azio en la malfrua dek-naŭa kaj frua dudeka jarcentoj. Fogel akcentis la transnaciecon de la intelektaj interŝanĝoj, kiuj faciligis viglan disvastiĝon de Esperanto en Azio, kunligante la rusan Foran Orienton, Ĉinion, Japanion kaj Francion, kaj ankaŭ emfazis la historiajn ligojn inter anarkiistaj kaj esperantistaj movadoj en Japanio kaj Ĉinio.

Poste, la artikolo de **Yauheniya Hudziyeva** (ricevanto de ESF-subvencio por Interlingvistika Subteno) “Lingva imperiismo kaj kolonia rezisto: Proletaj esperantistoj en la periferioj de la Japana Imperio” diskutis la rilaton de la Esperanto-movadoj kun lingvaj kaj kulturaj politikoj de la japana imperiismo. Pridubante la eblon de “neŭtraleco” de Esperanto dum la tempoj, kiam lingvo estis aktive politikigita kaj naciigita, la prezento esploris proponojn enkonduki Esperanton kiel la duan lingvon de Manĉukuo (1932–1945), kaj kontraŭkolonian reziston de proletaj esperantistoj en Tajvano (Lian Wenqing kaj Yamaguchi Koshizu).

La artikolo de **Kazumi Kamimura** “La proleta Esperanto-movado en la tempoj de subpremo kaj konvertiĝo” enkondukis agadojn de japanaj proletaj esperantistoj dum la periodo de severa polica persekuto. Analizante eldonaĵojn de proletaj esperantistoj en la 1930-aj jaroj (tiaj kiel *Marŝu*, *Studo pri la lingvo internacia* (國際語研究) kaj *Majo*), Kamimura argumentis por zorgema reekzameno de la diversaj strategioj adoptitaj de proletaj esperantistoj en Japanio, kiuj “rezistis por vivi”, kaj daŭre imagis la pli justan estontecon atingotan pere lingva kaj socia reformo, malgraŭ la polica subpremado kaj plifortiĝo de faŝismaj movadoj.

Edwin Michielsen (ricevanto de la Stipendio Marjorie Boulton, 2021, <https://esfconnected.org/2022/01/31/stipendio-boulton/>) prezentis artikolon “Esperanto kontraŭ faŝismo: An U-Saeng kaj la esperantistaro dum la Japana-Ĉina Milito”, kiu esploris kiel esperantistoj rezistis militismon kaj faŝismon post la komenco de la dua japana-ĉina milito. Enfokusigante la internacian komunumon de esperantistoj-aktivuloj en suda Ĉinio, Michielsen prezentis la ĵurnalismajn kaj kreaĵajn agadojn de korea esperantisto kaj verkisto An U-Saeng (Elpin), kiu uzis Esperanton por informi la mondon pri la realaĵoj de la vivo en Ĉinio, kaj ankaŭ levis la verdan flagon kontraŭ la teruroj de la milito kiel simbolon de espero por paca estonteco.

Fine, **Nadine Willems** afable faris komentojn pri ĉiuj artikoloj, substrekante la transnacionecon de la movadoj, la historian duoblan servon de Esperanto kiel egaleca ideologio en si mem kaj kiel komunikilo, ĝian politikan implicon, kaj la gravecon de la koloniisma kunteksto por diskuti pri la situo de Esperanto kiel “lingvo de malkonsento / reĝimkritikado”.

Kelkaj el la temoj, kiuj aperis dum la vigla diskuto kun la aŭskultantaro post la prezentoj, estis: la signifo de la okcidenteŭropa origino de Esperanto por la kunteksto de kontraŭimperiisma penso en Azio; la rilato de la lukto de indiĝenaj homoj en la japana imperio kun esperantismo; kaj la cenzuro kaj polica subpremado de la movado, kaj ankaŭ genraj aspektoj de Esperanto.

Mi ŝatus esprimi miajn korajn dankojn al la organizanto de la panelo, Edwin Michielsen; al la prezentistoj, la diskutanto kaj la aŭskultantaro pro la priluma diskuto; kaj laste sed ne malgrave, al la donema subteno de ESF, kiu ebligis mian ĉeeston. Ni esperu, ke la studoj de Esperanto-movadoj en Azio daŭre konstruos pontojn trans regionoj kaj fakoj, esplorante kaj vastigante la riĉan historion de esperantistoj, kiuj laboris je la nomo de pli justa mondo kaj senlima solidareco.

Yauheniya Hudziyeva estas membro de la Postdiploma Lernejo pri Internacia Kulturo kaj Komunik-Studoj ĉe Vaseda-Universitato en Tokio (Japanio).

Intervjuo kun Anna Löwenstein

Alessandra Madella

<https://esfconnected.org/2022/06/06/intervjuo-anna-lowenstein/>

Ĉi tiu intervjuo kun la brita verkistino estis farita de Alessandra Madella kaj unue aperis en la retejo de Ĉina Radio Internacia en januaro 2022:

<https://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220112/727941.html>. *Ŝi afable proponis reaperigi ĝin ĉi tie.*

Ĉu vi bonvolus paroli pri via lasta romano, *La memorajoj de Julia Agripina*?

Temas pri Agripina, la patrino de romia imperiestro Nerono. Mi komencis interesiĝi pri ŝi esplorante pri mia romano *Morto de artisto*, ĝuste pri Nerono. Tiam mi komprenis, ke Agripina estas multe misprezentata de la romiaj historiistoj de tiu epoko. Modernaj historiistoj komencas rerigardi la situacion kaj kompreni, ke la vidpunkto de romiaj historiistoj ne vere akordiĝas kun la modernaj ideoj. Ili opiniis, ke ambicia aŭ potenca virino estas malbona virino. Sed en la nuna tempo, se virino volas aktivi en la politika mondo, ni ne plu pensas, ke ŝi havas neakcepteblan ambicion. Agripina edziniĝis kun imperiestro Klaudio kaj ŝi kunlaboris kun li. Kiel oni vidis ĝin tiam, Klaudio estis sub la rego de sia edzino. Nun ni dirus, ke ŝi tre bone kunlaboris kun sia edzo. Ili havis komunajn ideojn kaj realigis ilin kune. Tiu nova rigardo al Agripina interesis min kaj mi volis verki romanon pri ŝi.

Kiel ŝi estis malsama de aliaj romiaj virinoj de la sama epoko?

Ŝi certe ricevis tre bonan edukadon, same kiel aliaj virinoj de la imperia familio. Sed ŝi ne volis resti en la ombroj. Ŝi volis esti aktiva en la politika vivo, same kiel viroj. Ŝi ne estis kontenta de tiu rolo, kiun oni tiam asignis al virinoj. Ŝi volis mem esti videbla.

Laŭ kiom da voĉoj estis verkita la romano?

Ĝi estis verkita laŭ tri malsamaj voĉoj. Mi montras scenojn, kiuj ilustras diversajn momentojn de la vivo de Agripina. Ili estas verkitaj en la tria persono, laŭ ŝia vidpunkto. Krom tio, Agripina verkas siajn memoraĵojn en la unua persono. Sed aperas ankaŭ ŝiaj pensoj, dum ŝi verkas la memoraĵojn, ĉar ŝi foje kaŝas la veron aŭ mem inventas ion. La legantoj povas vidi tion, ĉar ili ankaŭ legis la scenon, en kiu la afero efektive okazis.

Ĉu tiuj memoraĵoj de Agripina vere ekzistis?

Jes, la historiisto Tacito aludas al la fakto, ke ŝi verkis siajn memoraĵojn. Li citas kelkajn faktojn el ili, same kiel la verkisto Plinio la Pli Aĝa. La memoraĵoj ekzistis, sed ili ne travivis. Tio lasas tre oportunan truon por verkisto de historiaj romanoj, kiu povas mem verki por Agripina.

Ĉu estis evoluo en la maniero, en kiu vi verkas pri virinoj en viaj romanoj?

En la unua romano estis tre ordinara virino, kiu poste fariĝis sklavino. En ĉi tiu romano mi verkas pri virino, kiu fariĝis la edzino kaj la patrino de imperiestro. Estas tute alia socia klaso. En la dua romano, *Morto de artisto*, la viro estas la rakontisto. Estas malfacile verki tiun romanon el la vidpunkto de virino, ĉar virinoj malpli povis esti en la centro de agado, rilati kun la imperiestro kaj vidi ĉion, kio okazis.

Ĉu vi ĉiam pensas viajn romanojn rekte en Esperanto?

Ne, mi fakte verkis ilin en la angla. Sed mi konstatis, ke estas multe malpli facile eniri la anglalingvan libro-merkaton ol la Esperantan. Nur la unua, *La ŝtona urbo*, aperis en la angla, dum ĉiuj tri Esperantaj versioj aperis kaj estas verŝajne multe pli sukcesaj ol ili iam ajn estus en la giganta anglalingva merkato.

Kia estas la traduka procezo de viaj romanoj?

Mi provas traduki ilin tre precize. Mia celo estas redoni precize la pensojn kaj la etoson de la originalo, eĉ iom ŝanĝante la precizajn vortojn.

Kial vi pensas, ke ankaŭ aziaj legantoj ŝatas viajn romanojn?

Povus esti parte, ĉar mi uzas klasikan lingvaĵon. Verŝajne ili estas pli facilaj por ĉinaj aŭ japanaj legantoj. Krome, en *La ŝtona urbo* Bivana venas al Romo. Tiu kulturo por ŝi estas tute fremda kaj mi malpli faras supozojn pri tio, kion la legantoj jam scias, ĉar ŝi mem ne jam scias tion. Do eble tiu fremda kulturo iĝas pli facile enirebla de aziaj legantoj.

Kiu estas la kerna ideo de viaj kursoj pri verkado?

La ideo estas, ke oni disigu la du aspektojn: verkadon kaj redaktadon. La granda eraro, kiun aspirantaj verkistoj ofte faras, estas redakti tekston samtempe, dum oni kreas ĝin. Fakte, tio ege malhelpas. Mi malkovris tiun rapidan verkadon, dum mi legis librojn pri verkado en la angla. Mi provas prezenti ekzercojn, en kiuj oni verkas tre rapide kaj sen redaktado, kaj redaktas nur poste. Mi unue faris tion en Greziljono. La homoj tre ŝatis kaj volis daŭrigi ankaŭ poste. Do, ni kreis interretan grupon, kiu nomiĝas “8-minuta verkado”. Ĉiusemajne mi prezentas temon kaj la homoj devas verki pri ĝi por la posta semajno. Ankaŭ mia kurso pri literaturo dum la Itala Kongreso en Asizo ĉiumatene komenciĝis per ekzerco: okminuta verkado.

Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio, kaj Neregistaraj Organizoj – nemalhavebla kunlaboro

Humphrey Tonkin

<https://esfconnected.org/2022/06/20/nemalhavebla-kunlaboro/>

La Forumo de la Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio okazis en Ĝenevo de la 30-a de majo ĝis la 3-a de junio ĉi-jare, kaj Humphrey Tonkin, reprezentante Universalan Esperanto-Asocion ĉe UN en sia rolo kiel vicprezidanto de la Komitato de Neregistaraj Organizoj (NRO-oj) pri Lingvo kaj Lingvoj, estis invitita komenti – pere de Zoom, kaj en la angla – dum la unua tago. Jen tio, kion li diris.

Plezure mi aliĝas al tiu ĉi diskuto pri la rolo de civila socio en realigo de la celoj de la Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio. Vi aŭdas kaj vidas min dank’ al komunika teknologio, sed vi komprenas min, ĉar mi parolas la anglan lingvon. Komunika teknologio proponas grandegajn avantaĝojn, sed fundamenta al homa komunikado estas lingvoj kaj lingvaĵo.

Ni lastatempe establis la Komitaton de Neregistaraj Organizoj (NRO-oj) pri Lingvoj kiel t.n. substancan komitato de la Konferenco de NRO-oj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO). Ni celas altigi la konscion pri lingvoj kaj lingva diferenco en UN kaj antaŭenigi dialogadon inter la UN-komunumo kaj civila socio pri la demando kiel igi lingvan komunikadon pli efika, interalie per informa kaj komunika teknologio.

Ni ofte simple akceptas la lingvan situacion sen analizo. Lingvo kaj lingvaj demandoj eĉ ne menciigatas en la Celoj por Daŭripova Evoluigo (krom en du aludoj al nediskriminacio), malgraŭ tio, ke ili fundamentas ĉiujn deksep celojn. Nek ili menciigatis en la Jarmilaj Evoluigaj Celoj.



Kaj, anstataŭ novigi en la kampo de lingvoj, la Ĝenerala Asembleo de UN daŭre uzas kiel oficialajn lingvojn la kvar lingvojn de la venkintoj de la Dua Mondmilito antaŭ tri kvaronoj de jarcento (plus la hispana kaj la araba). Ĉu temas pri konveno aŭ pigro, kaj ĉu informaj kaj komunikaj teknologioj povus malfermi novajn eblojn?

Malfacilas ŝanĝi lingvajn reĝimojn: ĉe UN kaj ĝenerale, scio de difinitaj lingvoj avantaĝas iujn, malavantaĝas aliajn; manko de lingvoscio kreas barojn. Konsideru ekzemple la anglan lingvon. Okdek procentoj de la monda enloĝantaro havas nulan scion de la angla, laŭdire la lingvafrankao de la mondo. Parto de tiuj okdek procentoj neniam vizitis lernejon. Parto komencis sian edukadon ne en la gepatra lingvo sed en lingvo, kiun ĝi eĉ ne komprenis. Kiel ni povas fronti la problemojn de la mondo, se ni eĉ ne povas aŭdi grandan parton de la monda enloĝantaro?

Novigoj en informa kaj komunika teknologio (IKT) estas tre promesplenaj, se temas pri superado de lingvaj baroj kaj reduktado de edukaj neegalecoj. Ni devas urĝe ekzameni la rolon de IKT por krei pli egalecan lingvan ludkampon, eĉ inter la plej malavantaĝaj homoj de la mondo.

La Ĝeneva Deklaro de Principoj, de 2003, fonda dokumento en la nuna procedo WSIS (Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio), deklaras (A4), ke “komunikado estas fundamenta socia procedo, baza homa bezono kaj la fundamento de ĉiu socia organizo”. Tia komunikado estas unuavice per lingvo: ne konektiteco nek artefarita inteligento, sed lingvo. Per lingvaĵoj ni amas kaj malamas; per lingvaĵoj ni esprimas niajn plej internajn pensojn, pacajn kaj agresajn. Ni uzas lingvaĵojn por emfazi nian vidpunkton, por persvadi, por domini. Mia scio de la angla donas al mi avantaĝon – kaj ĉiam tion faros en anglalingva medio. Miaj lingvaj lertoj helpas persvadi aliajn angleparolantojn, ke mi pravas. Lingvoj estas ne nur instrumentoj de kompreno sed ankaŭ personaj potencigiloj. Estas home tiel uzi ilin. Ni devas rekoni tiun fakton, preni ĝin en konsideron, dum ni fasonas inkluzivajn lingvajn politikojn.

La Ĝeneva Deklaro de Principoj krome asertas (A9), ke: “Ni konscias, ke informaj kaj komunikaj teknologioj estu rigardataj kiel iloj kaj ne kiel celoj en si mem.” IKT “povas ankaŭ instigi dialogon inter homoj, nacioj kaj civilizoj”. Sed, la Deklaracio aldonas (A52-A54), ili devas preni en konsideron kulturen kaj lingvan diversecon: “La kreado, disvastigo kaj konservado de enhavo en diversaj lingvoj kaj formoj devas ricevi altan prioritaton en la konstruado de inkluziva Informada Socio.”

Sidante tie ĉi en nia internacia medio, ni povas facile imagi, ke ni esence solvis la problemon de lingva diverseco. Ni uzas la anglan aŭ la francan – aŭ helpas nin lertaj interpretistoj kaj

tradukistoj kaj ankaŭ la teknologioj, kiujn ili havas je sia dispono. Ni havas la impreson, ke ni povas konversacii kun la mondo. Verdire ni povas paroli al la mondo, sed la plimulto de civila socio ne povas aŭdi nin pro lingvaj baroj: ni kreis hierarkion de lingvoj, favorante kelkajn kaj flankigante aliajn. Ni kapablas paroli sed ne ĉiam scipovas aŭskulti. Sed daŭripova evoluigo devas inkluzivi la homojn ĉe la margenoj, kaj ni devas aŭdi ilin.

Pozitive estas, ke UN pli kaj pli konsciiĝas pri la problemo, eĉ se ĝi ne plene operaciigis tiun konscion. Ĝi draste fortigis sian multlingvan etendiĝon: ĝi nun uzas pli da lingvoj por komuniki kun la mondo ol iam ajn antaŭe, dank' al intensaj klopodoj de, interalie, la Departemento de Tutmonda Komunikado. Tamen, UN ankoraŭ plilertas je parolado ol je aŭskultado. Kaj civila socio, siavice, parolas multajn lingvojn kaj, en mondo kie ni bezonas ĉies kunlaboron, ĝi ofte povas nek kontribui al la internacia debato nek rebati.

Tiurilate, ni nuntempe festas iaspecan centjaran jubileon. En junio 1922, preskaŭ precize antaŭ cent jaroj, la Kvina Komitato de la Ligo de Nacioj, kunveninte en Ĝenevo, apogis raporton de la suba ĝenerala sekretario pri intelekta kunlaboro, Inazō Nitobe, kiu rekomendis esploron de neŭtrala internacia lingvo kiel komunikilo trans lingvaj limoj. Necesis du da jaroj por ke parolantoj de la franca faligu tiun ideon, konfirmante la francan kaj la anglan kiel la lingvojn de la Ligo. La lingva demando malaperis el la Liga tagordo. Kaj kiam fondiĝis UN, kiel ni jam rimarkis, lingva malegaleco estis bakita en ĝian strukturon. Kiam, sesdek jarojn post la raporto de Nitobe, la Raporto MacBride pri Internacia Komunikado estis publikigita de Unesko en la jaro 1980, ĝi enhavis nur unu aludon al lingvoj, aldonitan al la raporto de tunizia diplomato malgraŭ protestoj, ke “communications” (plurale: t.e. komunikaj teknologioj) kaj “communication” (singulare: komunikado) estas du tute apartaj aferoj.

Kompreneble ili neniel estas apartaj. Informaj kaj komunikaj teknologioj kaj ankaŭ artefarita inteligento fariĝas ĉiam pli kapablaj prilabori grandan diversecon de lingvoj, kreante ĉiam pli ebanan ludejon por la lingvoj de la mondo. Kiel reprezentanto al UN de Universala Esperanto-Asocio, mi daŭre kredas, kiel kredis Inazō Nitobe antaŭ cent da jaroj, ke ekzistas lingvaj solvoj al lingvaj diferencoj, inkluzive de teknologiaj solvoj. Se paco kaj kompreniĝo kaj daŭripova evoluigo entute ion ajn signifas, ni devas uzi ĉiujn eblajn rimedojn por antaŭenigi ilin. Kaj tio inkluzivas rektan alfronton al lingva diferenco. Nia nova Komitato de NROj pri Lingvoj lastatempe aŭdis raportojn pri la kuraĝiga laboro de Unesko rilate lingvojn, ekde edukado en la gepatra lingvo ĝis la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Kaj ni konscias pri ekinteresiĝo ankaŭ aliloke en la internacia komunumo, ekzemple la interesiĝo de la Monda Banko pri gepatralingva edukado.

Eble, dum la internacia komunumo plikonsciiĝos pri la bezono engaĝi civilan socion kiel tuton, ni rajtas esperi, ke aŭskulti la multajn voĉojn kaj lingvojn de la mondo fariĝos egale grava kiel disdoni instrukciojn. Informaj kaj komunikaj teknologioj povas ludi esencan rolon en tiu procedo, se ni povas etendi ilin al la periferioj de la socio kaj ne nur al la privilegiitoj. Mi esperas, ke nia nova komitato, kune kun civila socio kiel tuto, povos kontribui al tiu evoluo.

Nitobe-Simpozio: Lingvo, konflikto kaj sekureco

Michele Gazzola

<https://esfconnected.org/2022/07/04/nitobe-simpozio/>

La 26-an kaj 27-an de julio 2021, la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) organizis la retan internacian “Nitobe-Simpozion: Lingvo, konflikto kaj sekureco”.

Ĝiaj organizantoj estis Michele Gazzola, Angela Tellier, Mark Fettes kaj Humphrey Tonkin, kaj ĝi estis gastigita ĉe la Fakultato de Aplikataj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, Universitato de Ulstero (Nord-Irlando). Esperantic Studies Foundation malavare subtenis la eventon.

Ĉi tiu dutaga retseminario estis la plej lastatempa en serio de Nitobe-Simpozioj, kiuj kunigas diversan gamon da fakuloj kaj decidfarantoj por diskuti nuntempajn evoluojn en lingvopolitiko en internaciaj kaj tutmondaj kunteksto. Dum la du tagoj la programo esploris la sekvajn aspektojn de la ĉeftemo:

- ◆ Lingva politiko en Nord-Irlando kaj implico por povdividado en kontestataj socioj;
- ◆ Lingvo en humanitaraj krizoj kaj iniciatema packonstruado en la tutmonda kunteksto;
- ◆ Lingvo en la kunteksto de sekureco kaj konflikto-solvado en Eŭropo;
- ◆ Antaŭenigi lingvan justecon.

La Simpozio kolektis parolantojn el la akademia mondo, kaj decidantojn de la Belfasta Urba Konsilio, la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSCE) por Minoritataj Rajtoj, kaj Unesko. La aranĝo estis dulingva, angle–Esperante, kun samtempa interpretado disponebla. Aliĝis 230 personoj; ni havis 85 partoprenantojn (inkluzive de la prelegantoj kaj organizantoj) la unuan tagon, kaj 62 la duan tagon.

La Nitobe-Simpozio estis sekvo de la retseminario pri “Lingva justeco kaj publika politiko” organizita de Michele Gazzola kaj Cecilia Gialdini ĉe la Universitato de Ulstero la 16-an de oktobro 2020. La retseminario havis 76 partoprenantojn en la matena sesio, kaj 45 posttagmeze, plejparte de diversaj landoj en Eŭropo kaj la resto de la mondo.

Ni dankeme agnoskas la kontribuon de la interpretistoj, Duncan Charters kaj Istvan Ertl, kaj la teknikan subtenon de Tim Morley, Chuck Mays kaj Derek Roff. Kelkaj artikoloj de la simpozio estos publikigitaj en 2022 en la revuo *Language Problems and Language Planning* (“Lingvoproblemoj kaj lingvoplanado”). La programo kaj la resumoj estas haveblaj ĉi tie: <https://esfacademic.org/eo/nitobe-simpozio-2021/>

Stokholmo+50

<https://esfconnected.org/2022/04/04/stockholm50/>

<https://www.stockholm50.global/>

Granda konferenco de UN, “Stokholmo+50”, okazis en Stokholmo la 2-an kaj 3-an de junio 2022 kun la temo “Sana planedo por ĉies prospero: nia respondec, nia ŝanco”. Prepara kunsido pri la konferenco okazis en marto en Novjorko, kun partopreno de CoNGO (la Konferenco de Neregistaraj Organizoj), kies membroj estas i.a. UEA kaj TEJO.

Metodoj de Interlingva Komunikado

<https://esfconnected.org/2022/04/06/kimura-methods/>

https://researchmap.jp/multidatabases/multidatabase_contents/detail/597783/187ab8cbe8268a10d81df3fa88275103?frame_id=1150640

Ekzistas diversaj strategioj por interlingva komunikado, inkluzive de planlingvo, pri kiuj okazis multaj diskutoj pri avantaĝo kaj malavantaĝo. Surbaze de surterena esploro ĉe la german-pola landlima regiono, KIMURA Goro Christoph unuafoje komparis diversajn strategiojn en la sama geografia kaj socia kunteksto. Tiu regiono aparte taŭgas por la esploro, ĉar – inter alie pro neekzisto de ĝenerale uzebla komuna lingvo – tie ĉiuj teorie eblaj strategioj estas reale uzataj. Estiĝis artikoloj pri bazaj trajtoj de diversaj strategioj kaj pri unuopaj strategioj. Fine li publikis japanlingvan libron, kiu kunigas ĉiujn aspektojn.

木村護郎クリストフ (2021) 『異言語間コミュニケーションの方法—媒介言語をめぐる議論と実際』大修館書店

Kimura, Goro Christoph (2021) *Igengokan komyunikasyon no hoho: baikaigengo wo meguru giron to zissai* [Metodoj de Interlingva Komunikado. Teorio kaj Praktiko de Vehiklaj Lingvoj], Tokio: Taishukan, 248 paĝoj.

“La nigra urbo” en Esperanto

<https://esfconnected.org/2022/04/08/nigra-urbo/>

<https://mek.oszk.hu/22700/22763/>

Nova Esperant-lingva romano, *La nigra urbo* de Kálmán Mikszáth, en traduko de László Pásztor, aperis en la Hungara Elektronika Biblioteko.

Indiĝenaj aferoj

<https://esfconnected.org/2022/04/12/indigenous-causes/>

<https://www.un.org/development/desa/un-desas-voice/things-you-need-to-know/2022/04>

Komenciĝas la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Jen ĝisdatigo de UN (anglalingve) pri indiĝenaj demandoj.

Magistriĝa interlingvistiko en Poznano

<https://esfconnected.org/2022/04/13/masters-poznan/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=870>

En la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando) jam de 1998 funkcias internaciaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj. Por la studjaro 2022–23 estas planate startigi du-jarajn magistrajn studojn por internacia studentaro pri interlingvistiko enkadre de la fakto Lingvistiko kaj Informmastrumado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj).

Vortoj, kies sonojn ni amas (kaj male)

<https://esfconnected.org/2022/04/15/words-love-hate/>

<https://www.independent.co.uk/life-style/why-love-hate-certain-words-b2033179.html>

En 1929, la germana psikologo Wolfgang Köhler observis, ke, kiam oni montris al hispanlingvanoj iun rondan formon kaj iun pikecan kaj demandis ilin, kiu formo laŭ ili nomiĝas *baluba* kaj kiu estas *takete*, plej multaj ligis *baluba* al rondeco kaj *takete* al pikeco. Postaj studoj trovis similajn modelojn inter usonaj studentoj kaj parolantoj de la tamila lingvo en Barato.

Plurlingvula Kunveno virtuale

<https://esfconnected.org/2022/04/18/polyglot-gathering/>

<https://www.polyglotgathering.com/2022/eo/online/>

La ĉiujara Plurlingvula Kunveno estas la monde plej granda internacia evento por plurlingvuloj kaj lingvoamantoj. Ĉi-jare ĝi okazis de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de maio, kaj individuaj membroj de UEA rajtis pri 40%-a rabato (pagante 30 eŭrojn anstataŭ 50), se ili aliĝis antaŭ la 25-a de aprilo.

Ĉu similas la ukraina kaj rusa lingvoj?

<https://esfconnected.org/2022/04/19/ukrainian-russian/>

<https://theconversation.com/ukrainian-and-russian-how-similar-are-the-two-languages-178456>

Putin sugestis, ke ukrainoj kaj rusoj kunhavas unu lingvon, sed la diferencoj sumiĝas al pli ol tio, kion li en 2021 formetis kiel nur “regionajn lingvo-partikularaĵojn”. Ĉi tiu artikolo diskutas la politikajn sekvojn kaj konkludas, ke, kiam li serĉis lingvan “unuecon”, Putin mobilizis argumenton por permesi al Rusujo la rajton interveni en tio, kio laŭ lia aserto estas rusa spaco.

Ĉimpanzoj gestas laŭ lingvaj leĝoj

<https://esfconnected.org/2022/04/20/chimp-gestures/>

<https://royalsocietypublishing.org/doi/10.1098/rspb.2018.2900>

Laŭ studo publikigita de la Reĝa Societo de Londono, ĉimpanzaj gestoj sekvas la samajn matematikajn modelojn, kiujn oni vidas en la homa lingvo. Ekzemple aranĝojn kongruajn kun la mallongiga leĝo de Zipf (kiu prognozas inversan rilaton inter la longo de vorto kaj ĝia uzofteco) oni trovis en la voĉa kaj nevoĉa kondutoj de diversaj bestoj.

Antaŭfigura politiko

<https://esfconnected.org/2022/04/22/prefigurative-politics/>

<https://www.anthroencyclopedia.com/entry/prefigurative-politics>

<https://www.anthroencyclopedia.com/>

Subtenate de ESF, Guilherme Fians aperigis artikolon “Prefigurative Politics” (“antaŭfigura politiko”, speco de soci-movada strategio) en *Cambridge Encyclopedia of Anthropology*.

Temas pri 18-paĝa artikolo, kiu kritize revizias la soci-sciencan bibliografion kaj debatojn pri tiu temo. La teksto mencias Esperanton, kiam ĝi diskutas movadojn, kiuj kontraŭstaras hegemoniajn manierojn uzi lingvojn kaj komunikilojn. La biografieto pri la aŭtoro mencias la financan subtenon de ESF.

KER-ekzamenoj rete en junio kaj julio

<https://esfconnected.org/2022/04/26/ker-ekzamenoj/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=869>

<https://edukado.net/novajhoj?id=871>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_E%C5%ADropa_Referenckadro_por_Lingvoj

Universala Esperanto-Asocio anoncis tri ekzamenperiodojn por la jaro 2022 rilate al la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj:

- ◆ En junio–julio eblos rete trapasi Esperantajn ekzamenojn: ĉiu el sia propra hejmo povos ekzameniĝi.
- ◆ En aŭgusto dum la UK okazos paperaj ĉeestaj ekzamenoj.
- ◆ Fine de novembro, kadre de la Tutmonda Ekzamentago oni organizos ĉeestajn sesiojn, dise en la mondo.

Kiam ĉi tiu artikolo aperis en la blogo *ESF Connected* en aprilo, ankoraŭ eblis aliĝi al la retaj ekzamenoj. Oni petis nepre legi pri la teknikaj kondiĉoj (<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/proctor>). Por helpi orientiĝi kaj doni konsilojn, Katalin Kovats okazigis per Zoom plurajn retajn konsulthorojn, al kiuj senanonce kiu ajn estas bonvena.

Konferenco LINELT-2022

<https://esfconnected.org/2022/04/27/linelt-2022/>

<http://www.linelt.org/>

La 10-a Monda Konferenco pri Lingvoscienco kaj Instruado de Fremdaj Lingvoj (LINELT-2022) okazis en Lara-Antalya (Turkio) de la 12-a ĝis la 14-a de majo, kaj virtuale kaj ĉeeste.

Lingvoscienco kaj komputa scienco

<https://esfconnected.org/2022/04/28/linguistics-computer-science/>

<https://www.zdnet.com/education/computers-tech/linguistics-and-computer-science/>

Lingvoscienco ekzamenas esprimadon, komprenigon kaj la evoluon de naturaj lingvoj, komputa scienco aplikas la samajn demandojn al programado. Ambaŭ kampoj esploras sintakson, semantikon kaj instrukciojn, kaj kiel homoj perceptas ilin. Ĉi tiu mallonga artikolo klarigas, kiel komputa scienco povas helpi al lingvistoj studi naturajn lingvojn, kaj al komputosciencistoj ĉerpi de la lingvistoj, kiam ili elpensas programlingvojn.

Rilate, la Fako pri Ĉinaj kaj Dulingvaj Studoj de la Honkonga Politeknika Universitato serĉis Asistantan Profesoron pri Lingva Datumanalizo kaj Komputa Lingvoscienco:

<https://www.timeshighereducation.com/unijobs/listing/274145/assistant-professor-in-language-data-analytics-and-computational-linguistics/>

Kolokvo kun lingva/eduka temo

<https://esfconnected.org/2022/04/29/colloquium-language-education/>

<https://interact2022.sciencesconf.org/>

Internacia Kolokvo pri lingvaj interagoj en klasĉambro kaj pri la konstruado de scio en lernejoj okazos je la 6-a kaj 7-a de oktobro 2022 ĉe la Universitato de Lille sur la kampuso Pont de Bois, en Villeneuve d'Ascq.

Evoluo de la konstrueroj de lingvo

<https://esfconnected.org/2022/05/02/evolution-building-blocks/>

<https://www.newswise.com/articles/building-blocks-of-language-evolved-30-40-million-years-ago>

Relative lastatempa studaĵo montras, ke primatoj kaj simioj povas sekvi rilatojn inter sonoj sammaniere kiel homoj, kio indikas, ke ĉi tiu kapablo antaŭas la evoluon de lingvo mem je almenaŭ 40 milionoj da jaroj.

AI ekmastras lingvon

<https://esfconnected.org/2022/05/03/ai-mastering-language/>

<https://mallonge.net/n8>

Neŭraj retoj kiel GPT-3 de OpenAI nun povas verki originalan prozon kun kaptorna flueco – evolupaŝo, kiu eble rezultigos profundajn sekvojn en la estonteco, kiel oni diskutas en la jena interesea artikolo en *New York Times*.

Pozitivaj kaj negativaj adjektivoj pri virinoj kaj viroj

<https://esfconnected.org/2022/05/04/positive-negative/>

<http://www.sci-news.com/othersciences/linguistics/literature-women-men-07558.html>

Esploristoj ĉe la Universitato de Kopenhago tralaboris 3,5 milionoj da fikciaj kaj nefikciaj libroj eldonitaj en la angla inter 1900 kaj 2008, por ekzameni, ĉu ekzistas diferenco inter la vortospecoj uzataj por priskribi virojn kaj virinojn en literaturo. Ili konfirmis disvastiĝintan opinion.

Sano kaj la gaja hispana vortoprovizo

<https://esfconnected.org/2022/05/05/health-spanish/>

<https://theconversation.com/>

[the-cheerful-lexicon-of-the-spanish-language-may-help-solve-a-health-mystery-called-the-hispanic-paradox-173598](#)

Dum la angla estas la lingvo de scienco – preciza kaj konciza – la florea naturo de la hispana kontribuas al kulturo, kiu subtenas emocian esprimadon. Tiel farante, ĝi povas helpi al siaj parolantoj regi la respondon al streso. Terapiisto en ĉi tiu artikolo uzas la hispanlingvan kapablon etigi kaj egigi per simpla aldono de sufiksoj por helpi sian pacienton tra malfacila fazo de terapio.

Paroli kun alimondanoj

<https://esfconnected.org/2022/05/06/talking-to-aliens/>

<https://www.wired.com/story/do-we-need-a-special-language-to-talk-to-aliens/>

La jena artikolo en la magazino *Wired* demandas: kiel oni komunikus kun inteligenta estulo, pri kiu oni scius nenion? Homoj estas la sola specio sur la Tero kun altagrada matematika kapablo kaj plene evoluinta lingvopovo, sed ĉu tiuj estas signoj de inteligenteco aŭ homaj idiosinkrazioj? Ĉu ekzistas vere universala flanko de inteligenteco?

Orwell kaj Esperanto

<https://esfconnected.org/2022/05/10/orwell-esperanto/>

<https://www.darcymoore.net/2022/04/18/orwell-newspeak-esperanto/>

En 1975, la nederlanda matematikisto, poeto, lingvisto kaj esperantisto d-ro W. A. Verloren Van Themaat skribis al kavaliro Bernard Crick pri la ebla influo de Esperanto al la romano *Mil Naŭcent Okdek Kvar* de George Orwell. Ĉi tiu artikolo esploras la temon.

Jarkonferenco de NJTESOL/NJBE

<https://esfconnected.org/2022/05/11/njtesol-njbe/>

<https://njtesol-njbe.org/>

<https://njtesol-njbe.org/spring-conference/>

La usona organizaĵo NJTESOL/NJBE (Nov-Ĵerzejaj Instruistoj de la Angla al Parolantoj de Aliaj Lingvoj / Nov-Ĵerzejaj Dulingvaj Edukistoj) uzas retroŝtajn dissendolistojn kaj lokajn laborgrupojn por antaŭenpuŝi la voĉojn de instruistoj, kaj de studentoj dulingvaj aŭ de la angla kiel dua lingvo, pri leĝoj rilataj al ili. Ĝia jarkonferenco okazis en junio.

Esea premio pri lingva diskriminacio

<https://esfconnected.org/2022/05/12/essay-prize/>

https://think.taylorandfrancis.com/special_issues/philosophical-psychology-understanding-bias/

La revuo *Philosophical Psychology* (Filozofia Psikologio) anoncas la Esean Premion Lex Academic, aljuĝotan al la verkinto de la plej bona eseo pri la kompreno de lingva diskriminacio.

Komuna Voĉo

<https://esfconnected.org/2022/05/13/common-voice/>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Common_Voice

<https://discourse.mozilla.org/t/ep-2-community-funding-workshop-21st-april/95695>

Ĉu vi kontribuis vian voĉon al la projekto *Common Voice* (Komuna Voĉo) de Mozilla? La celo estas krei liberan datumbazon por voĉekonaj programoj. Ekzistas nun ankaŭ forumo por kunlabori i.a. pri akirado de mona subteno por specifaj lingvaj komunumoj.

Esperanto kaj religio

<https://esfconnected.org/2022/05/16/esperanto-religion/>

<http://www.unicaen.fr/mrsh/hce/index.php?id=2359>

Iujn el la ĉefaj pontolingvoj de la mondo oni povas proksime rilatigi al apartaj religioj – Latino kaj katolikismo, la araba kaj Islamo, Sanskrito kaj hinduismo, kaj tiel plu. Ĉi tiu artikolo ekzamenas la kontrastan modelon, kiun proponas Esperanto.

Kiel infanetoj distingas parolsonojn

<https://esfconnected.org/2022/05/17/infants-speech-sounds/>

<http://www.sci-news.com/othersciences/psychology/science-infants-tongue-movement-speech-sounds-03336.html>

Esploristoj ĉe la Universitato de Brita Kolumbio malkovris rektan ligon inter la langomovoj de infanetoj kaj ilia kapablo distingi parolsonojn.

Konferenco pri lingvo-akirado

<https://esfconnected.org/2022/05/19/acquisition-conference/>

<http://www.icfsla.us.edu.pl/>

La 33-a Internacia Konferenco pri Akirado de Fremdaj kaj Duaj Lingvoj okazis en majo ĉe la Universitato de Silezio en Szczyrk (Pollando). Ĝia temo estas modernaj teknologioj en la instruado, lernado kaj esplorado de fremdaj lingvoj.

“Rasismo” havas tro da difinoj

<https://esfconnected.org/2022/05/20/racism-definitions/>

<https://mallonge.net/oc>

Jena artikolo de John McWhorter atentigas, ke la vorto “rasismo” estas ĉiam pli uzata rilate *kaj* al perfortaj krimoj de malamo *kaj* al malsamaj atingoj en normigitaj testoj: “Unu el la plej dornaj flankoj de la nuntempa rasdebato estas, ke ni komencis apliki tiun vorton al fenomen-amplekso sufiĉe vasta por eble konfuzi eĉ la plej bonintencajn homojn.”

Diskriminacio kontraŭ fremdaj akĉentoj

<https://esfconnected.org/2022/05/25/discrimination-foreign-accents/>

<http://pc.rhul.ac.uk/sites/SNL/wp-content/uploads/2021/11/Budoch-Grabka-Lev-Ari-2021-Exposing-individuals-to-foreign-accent-increases-their-trust-in-what-nonnative-speakers-say.pdf>

Studo pasintjare publikigita de Katarzyna Boduch-Grabka kaj Shiri Lev-Ari ĉe Royal Holloway (Universitato de Londono) montras, ke mallonga sperto de fremda akĉento povas malpliigi la antaŭjuĝon, pro kiu homoj emas malpli kredi informojn prezentatajn en akĉento ne-denaska. Legindas ankaŭ konciza ĵurnalisma artikolo, kiu mencias la studon: <https://theconversation.com/heres-why-people-might-discriminate-against-foreign-accents-new-research-172539>

Kiel fetoj lernas lingvon

<https://esfconnected.org/2022/05/26/fetuses-learn-language/>

<https://www.bbc.com/news/world-us-canada-22457797>

Esploroj montris, ke beboj naskiĝas kun la kapablo rekoni konatajn sonojn kaj lingvoritmojn. La studo trovis, ke dum la finaj 10 semajnoj de gravedeco, fetoj aŭskultas la komunikadon de la patrino, kaj kiam ili naskiĝis, ili povas indiki, kion ili aŭdis.

Kunekzisto de la afrik-usona kaj la norma anglaj lingvoj

<https://esfconnected.org/2022/05/27/black-standard-english/>

<https://mallonge.net/ny>

La jena artikolo en *New York Times* diskutas lastatempan aserton, ke la postulo, ke studentoj hejme parolantaj nenorman dialekton de la angla verku universitate en la norma angla, estas nejusta kaj eĉ rasisma. Ĝi argumentas, ke kaj la afrik-usona kaj la norma anglaj lingvoj estas partoj de la identeco de plej multaj afrik-usonanoj.

Fruaj minacoj al Esperanto

<https://esfconnected.org/2022/05/30/early-threats/>

<https://pdxscholar.library.pdx.edu/cgi/viewcontent.cgi?article=1242&context=younghistorians>

Anabel E. Cull prezentis artikolon sub la titolo “Skismo kaj subpremo: Fruaj minacoj al la lingvo Esperanto, kaj sekvaj efikoj sur internacia akcepto” kadre de la Konferenco de Junaj Historiistoj 2022 ĉe Portland State University (Oregono).

Maŝinintelekto kaj la evoluo de ASL

<https://esfconnected.org/2022/06/01/ai-asl/>

<https://www.sciencedaily.com/releases/2022/04/220407161947.htm>

En la usona gestolingvo (ASL) gestoj, kiuj maloftas aŭ uzas nekutimajn manformojn, estas farataj pli proksime al la vizaĝo de la gestanto, kie homoj ofte rigardas dum la perceptado de gestoj. Kontraste, oftaj gestoj kaj tiuj kun pli ordinara manformoj estas farataj pli fore de la vizaĝo. La trovoj de lastatempa pristudo per maŝinintelekto sugestas, ke ASL evoluis tiel, ke homoj pli facile rekonu la gestojn.

Ne ĉiuj libroj kostas

<https://esfconnected.org/2022/06/03/occasionally-books-are-free/>

<https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>

La eldonejo Sezonoj, mastrumata de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka, proponas 19 Esperanto-librojn senpage deŝuteblajn kune kun kelkaj malnovaj numeroj de la revuo *La Ondo de Esperanto*.

Naciigita kosmopolitismo

<https://esfconnected.org/2022/06/07/nationalized-cosmopolitanism/>

https://www.cambridge.org/core/services/aop-cambridge-core/content/view/74435A78B178F983BFBCDA1637C746E2/S0145553222000050a.pdf/nationalized_cosmopolitanism_with_communist_characteristics_the_esperanto_movements_survival_strategy_in_postworld_war_ii_bulgaria.pdf

En ĉi tiu artikolo, sociologo Ana Velitchkova ekzamenas la periodaĵon *Bulgara Esperantisto* dum du jaroj tuj post la fino de la Dua Mondmilito por vidi, kiel la bulgara Esperanto-movado ĉizis por si spacon en la nova politika situacio per antaŭenigo de formo de tio, kion ŝi nomas “naciigita kosmopolitismo”.

Geedzoj kaj albebj voĉoj

<https://esfconnected.org/2022/06/09/couples-and-baby-talk/>

<https://theconversation.com/why-do-couples-use-baby-talk-with-one-another-171361>

Ĉi tiu lastatempa ĵurnalisma artikolo diras, ke laŭ la teorio de korinklina interŝanĝo, proponita de la esploristo Kory Floyd, specifaj voĉkondutoj signalas korinklinon. Inter tiuj estas la uzo de alta tono, pliigita intonacio kaj dolĉa voĉo – trajtoj, kiuj hazarde iom koincidas kun la maniero, laŭ kiu plej multaj homoj parolas al beboj.

Konferenco pri Mediteranea kaj Eŭropa Lingvo-Antropologio

<https://esfconnected.org/2022/06/13/comela-2022/>

<https://comela2021.uoa.gr/links/>

Ĉe grava konferenco okazinta de la 19-a ĝis de 23-a de julio, pli ol 450 kleruloj kunvenis por prezenti referaĵojn kaj por diskuti progreseme pri lingvo-antropologio, lingvo kaj socio, sociolingvoscienco kaj rilataj kampoj en Eŭropo kaj Mediteraneo. La temo estis “Limhavaj lingvoj ... senlimaj”, kaj prelegontoj devis aliĝi antaŭ la 23-a de junio.

Esplorante Inkluzivon / Lingvoj por Demokratio

<https://esfconnected.org/2022/06/14/exploring-inclusivity/>

<https://www.tejo.org/partoprenu-la-seminariojn-esplorante-inkluzivon-au-lingvoj-por-demokratio-dum-ijk-en-nederlando/>

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo organizas du internaciajn seminariojn “Esplorante Inkluzivon: Atingo de vere inkluzivaj socioj” kaj “Lingvoj por Demokratio: Revigligado de plurismaj demokratioj kaj lingvaj rajtoj”.

La seminarioj, okazontaj de 21-a ĝis 25-a aŭgusto dum la IJK en Westelbeers (Nederlando), donos la eblon al 40 junuloj (20+20) el membroŝtatoj de la Konsilio de Eŭropo diskuti kaj lerni pli pri la temo de tutmonda civitaneco post la KOVIM-pandemio rilate al inkluzivo, aŭ pri lingvaj rajtoj kaj demokratio.

Esperanto kiel pontoreligio

<https://esfconnected.org/2022/06/16/esperanto-bridge-religion/>

<https://blogperle.unical.it/wp/rivistaocchiali/wp-content/uploads/sites/6/2022/04/N.9-Occhiali.pdf>

La anglalingva artikolo “Kristanoj, judoj kaj islamanoj, ni ĉiuj loĝas ĉe la sama maro. Pri la etimologio de Eŭropo” de Davide Astori (sur paĝoj 23–38 de numero 9/2021 de la revuo *Occhiali*) havas sekcion pri la ideo de Zamenhof, ke Esperanto povu servi kiel pontoreligio.

165-a datreveno de Grabowski

<https://esfconnected.org/2022/06/17/grabowski-165/>

<https://sezonoj.ru/2022/06/grabowski-3/>

Antaŭ 165 jaroj, la 11-an de junio, naskiĝis Antoni Grabowski (1857–1921), pola kemiisto, terminologo, poligloto, volapukisto kaj esperantisto; la unua prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (1908–21), sekretario de la unua Universala Kongreso de Esperanto (Bulonjo-ĉe-Mar, 1905), dekomenca membro de la Lingva Komitato (1905–21) kaj Akademio de Esperanto (1908–21), direktoro de la Akademia sekcio por la Gramatiko (1908–21), “la patro de la Esperanta poezio”, kaj tradukinto de pluraj prozaj kaj poeziaj verkoj, inter kiuj estas la antologio *El Parnaso de Popoloj* (1913), kompilita kaj tradukita de li el trideko da lingvoj, kaj *Sinjoro Tadeo* (1918) de Adam Mickiewicz.

Seminario pri artefaritaj lingvoj en Tours

<https://esfconnected.org/2022/06/21/seminar-tours/>

<https://utbox.univ-tours.fr/s/de2NzacSdbdpN33>

De la fino de aprilo ĝis la frua parto de junio okazis semajna seminario pri artefaritaj lingvoj en la Universitato de Tours (Francio), kun prezentoj de (“La Esperanta parolkomunumo: sociologiaj, ideologiaj, kulturaj kaj lingvosciencaj aspektoj”), Pascal Nouvel (“Evoluo de naturaj kaj artefaritaj lingvoj kaj biologia evoluo”), Pascal Dubourg-Glatigny (“Historio de Esperanto, ĉu de movado aŭ de esperantistoj?”), Christopher Gledhill (“La konstruitaj kaj imagitaj lingvoj rilate al aŭtomata neŭroneta tradukado”) kaj Natalia Dankova (“Esperanto, lingvo internacia laŭ pluraj aspektoj lingvosciencaj kaj kulturaj. Analizo de parola komunikado”).

Ĉu Esperanto mortas en Ĉinio?

<https://esfconnected.org/2022/06/23/esperanto-china/>

<https://glocal.soas.ac.uk/chinese-esperanto/>

Ĉi tiu artikolo (anglalingva) en la retejo de la Tutmonda Konsilio por Antropologia Lingvoscienco resumas la historion de Esperanto en Ĉinio kaj rigardas estontecen:

“Se Ĉinio daŭre kreskos, verŝajne estiĝos batalo inter la ĉina kaj angla lingvoj. Kiam tio okazos, oni bezonos kompromison; tiam Esperanto povus utili.”

Aliecigo en terorista diskurso

<https://esfconnected.org/2022/06/24/othing-terrorist/>

<https://www.nature.com/articles/s41599-022-01178-5>

La artikolo “Esploro pri la gramatiko de aliecigo kaj antagonismo kiel realigitaj en terorista diskurso: pervorta agresemo cele al ekstremistigo”, laste aperinta en la anglalingva revuo *Naturo*, ekzamenas la rolon de iuj gramatikaj elektoj en la fenomeno “aliecigo” en ekstremistiga diskurso.

Lingva rasismo en Britio

<https://esfconnected.org/2022/06/28/linguistic-racism-uk/>

[https://theconversation.com/
you-cant-even-talk-english-so-dont-talk-how-linguistic-racism-impacts-immigrants-in-the-uk-182173](https://theconversation.com/you-cant-even-talk-english-so-dont-talk-how-linguistic-racism-impacts-immigrants-in-the-uk-182173)

De infanludejoj ĝis laborejoj, homoj el komunumoj de enmigrintoj en Britio diras, ke proakĉenta rasismo tuŝas ilian ĉiutagan vivon. Tio nomiĝas lingva rasismo, kaj estas direktita kontraŭ tiuj, kiuj parolas en manieroj rigardataj kiel nenormaj aŭ “fremde sonantaj”. Ĝi baziĝas ne sur la kapableco aŭ komprenebleco de lingvoparolanto, sed efektive sur ties akĉento kaj maniero de elparolado. Jena artikolo esploras la problemon.

Kvirlingvistiko

<https://esfconnected.org/2022/06/30/queer-linguistics/>

<https://scotscoop.com/queer-linguistics-the-journey-to-reclaim-power-and-fight-for-linguistic-equality/>

Kiel nia ĉefa formo de komunikado, lingvo estas la fundamento de nia interagado kun la mondo. Tamen, por marĝenuloj kiel tiuj en la GLAT-komunumo, lingvo havas longan politike ŝargitan historion, kiu daŭre influas, kiel individuoj kaj la pli vasta socio perceptas la kviran komunumon hodiaŭ. Ĉi tiu artikolo diskutas la problemojn de genro-indika lingvaĵo.

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. La enhavo de ambaŭ kutime aperas pli frue en la blogo [ESF Connected](#). Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org aŭ contact@esfconnect.org. Limdato por la venonta numero: 30-a de septembro 2022. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj.

ESF en la reto: www.esperantic.org, esfacademic.org, esfconnected.org, interlingvistiko.net, www.facebook.com/esperantic. Tvitero: [@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf), [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic).

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>